



Manlibro **pri** **Instruado** **de** **Esperanto**

Parto 2 (ĉapitroj 6-11)



Projekto “Flugiloj de Malfacila Vento”, 2004



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Enhavo

6	Konsiloj pri lingvo-instruado	6-4
6.1	Formoj de la kunlaboro en la klaso	6-4
6.1.1	Tutgrupa instruado	6-4
6.1.2	Grupa laboro.....	6-4
6.1.3	Partnera laboro	6-6
6.1.4	Individua laboro	6-6
6.2	Instruistaj kapabloj kondukti en instrusituacioj.....	6-7
6.2.1	Motivigo.....	6-7
6.2.2	Reago al lernanto-kontribuoj.....	6-7
6.2.3	Informiĝi pri lernprogreso dum la instruado	6-8
6.2.4	Ekscii pri antaŭscioj	6-8
6.2.5	Doni informojn / klarigojn.....	6-8
6.2.6	Gvidi ekzercadon.....	6-9
7	Lecion-ideoj	7-10
7.1	Modelaj lecionplanoj.....	7-10
8	Ekzercoj.....	8-12
8.1	Ĝenerale pri lingvoekzercoj	8-12
8.2	Cel-lingvaj ekzercotipoj	8-12
8.2.1	Aŭtomataj ekzercoj:	8-12
8.2.2	Duon-aŭtomataj ekzercoj.....	8-18
8.2.3	Ne-aŭtomataj ekzercoj.....	8-21
8.3	Lingvaj ludoj	8-22
8.3.1	Lernado havas tri fazojn:	8-22
8.3.2	Trajtoj de ludoj	8-23
8.3.3	Tipoj de ludoj	8-23
8.3.4	Komunikadaj kaj lingvistikaj ludoj	8-23
8.3.5	Rolo de instruisto dum rol-ludoj kaj komunikad-ludoj	8-24
9	Ekzamensistemoj.....	9-25
9.1	Ekzamensistemo de UEA kaj ILEI.....	9-25
9.2	Ekzamensistemo de IEI.....	9-26
9.3	Ekzamensistemo de <i>lernu!</i>	9-26
10	Organizado	10-27
10.1	Kiel trovi lernantojn	10-27
10.1.1	Kontaktu amaskomunikilojn	10-27
10.1.2	Reklamu.....	10-27
10.2	Kiel organizi kursojn.....	10-27
10.3	Kiel instigi al envolvigo kaj plulernado	10-27
10.4	Kiel pritaksi kurson kun la lernantoj	10-28
10.5	Informilbazoj.....	10-28
11	Instruorganizoj.....	11-29
11.1	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.....	11-29
11.2	Internacia Esperanto-Instituto	11-29
11.3	Tutmonda Esperantista Junulara organizo.....	11-29
12	Fermaj vortoj	12-30

Ĉapitroj 1-5 de ĉi tiu manlibro aperas en aparta PDF-dokumentoj.



Kontribuintoj:

Atljo ORELLANA-ROJAS, Argentino/Nederlando (AOR)
Birke DOCKHORN, Germanio (BD)
Hokan LUNDBERG, Svedio/Serbio kaj Montenegro (HL)
Katalin Kovats, Hungario/Nederlando (KK)
Penny VOS, Aŭstralio (PV)
Radojica PETROVIĆ, Serbio kaj Montenegro (RP)
Slavik IVANOV, Rusio (SI)
Stefan MacGILL, Nov-Zelando/Hungario (SMG)
Zlatko TISLJAR, Slovenio/Kroatio (ZT)

Kelkaj kontribuintoj en la dua parto de la manlibro ne estas konataj.

© ILEI, Hago, Nederlando, Junio 2004.
Redakta kaj teknika pretigo: Stefan MacGILL

La projekto “Flugiloj de Malfacila Vento” kaj ĝiaj seminarioj estas subtenataj de [Esperantic Studies Foundation](#).

Ĉi tiu unua eldono en PDF-formato estas por la instru-trejnseminarioj kadre de la projekto dum 2004. La materialo estas ĉerpita el la viki-paĝaro kie la verko daŭre konstruiĝas.



6 Konsiloj pri lingvo-instruado

6.1 Formoj de la kunlaboro en la klaso

Dum la instruado eblas diversaj formoj, kiel la instruisto kaj la lernantoj aŭ la lernantoj inter si povas kune labori. Oni distingas:

- tutgrupan instruadon
- grupan laboradon
- partneran laboradon
- individuan laboradon

De tempo al tempo okazu ŝanĝo de kunlabora formo, same kiel la ŝanĝo de la temo, metodo aŭ ago – tio revekas koncentriĝon. Oni povas uzi diversajn formojn de kunlaboro ankaŭ por atingi certajn celojn. Ekzemple, oni donas al la lernantoj pli da okazoj por paroli, se oni lasas ilin samtempe labori en grupoj aŭ eĉ paroj. Partnera laboro ebligas ankaŭ individuan lernrapidecon. Tamen ne ĉiam ĉiu formo taŭgas, kaj la instruisto devas pripensi, kiun formon elekti.

6.1.1 Tutgrupa instruado

Karakterizaĵo

Ĝi estas la plej konata kaj 'tipa' instruformo. La instruisto estas la centro de la leciono kaj gvidas ĉiujn procezojn. Per tiu instruistocentra, alfronta instruado li/ŝi prezentadas lernaĵojn, demandadas por gvidi al iu tasko aŭ temo aŭ gvidas interparoladon aŭ diskuton kun ĉiuj lernantoj.

Apliko

Oni apliku tiun formon, kiam ĉiuj lernantoj sciu kaj aŭdu la samon aŭ kiam la instruisto bezonas kontroli la agon aŭ la lingvouzon de ĉiuj lernantoj. Tio povas esti ekzemple:

- klarigado (i.a. Prezento de nova materialo)
- prelegoj
- tutgrupaj diskutoj
- elparolekzercoj
- kolektado de rezultoj el partneraj kaj grupaj laboroj
- komparo de ekzercorezultoj
- ludoj

6.1.2 Grupa laboro

Karakterizaĵo kaj konsiloj

Kelkaj lernantoj (kutime inter tri kaj ses) laboras memstare pri certa tasko. Tio ebligas certgrade individuan lernrapidecon. Krome la instruisto povas respondi la specifaj demandoj, dum la aliaj laboras. Grupigaj kriterioj povas esti:

- lotumado (bildparoj, vortparoj, puzleroj)
- intereso
- kapabloj, lingvonivelo
- deziro
- aliaj kriterioj (ekz. okulkoloro, naskiĝdato)
- proksimeco de sidlokoj



Ĉu oni ofte regroupigu la lernantojn aŭ ne? Laŭ miaj spertoj estas bone miksi prefere en la komenco (per lotumado k.s.). Tiel la lernantoj ekkonas unu la alian kaj povas labori kun ankoraŭ nekonataj lernantoj. Post iom da tempo tamen plej ofte homoj, kiuj ŝatas unu la alian, sidas jam kune, tiam povas esti pli bone ne disigi tiujn preferojn. Tamen pro la grupdinamikaj procezoj indas remiksi de tempo al tempo – laŭ hazardo aŭ laŭ intencaj kriterioj. Foje ja necesas, ke oni ĝuste ne grupigu hazarde. Grupa laboro enhavas ankaŭ danĝerojn. Lernantoj eble ne ŝatas unu la alian kaj la kunlaboro ne bone funkcias – tio povas bloki la lernandon. Kiam estas konfliktoj inter lernantoj, tiam oni kontrolu, ke ili ne laboru kune. Eblas ankaŭ aranĝi, ke ili ja laboru kune, sed tio efikas ne tiom sur la enhava nivelo sed anstataŭe sur la socia nivelo de lernado. Grupa laboro tamen estas iuspeca defio por la instruisto kaj bezonas certan kapablon fari kelkajn aferojn samtempe: konsili, observi, reagi, havi superrigardon. Ne eblas retiriĝi kaj simple lasi la grupojn labori!

Ĝenerale grupa laboro havas plurajn tavolojn: ne estas nur la pura enhavo kaj praktikado, sed ankaŭ la organizado de laboro kaj la grupdinamiko / la rilatoj en la grupo. Pro tio tre gravas, ke la instruisto observu kaj subtenu pli ol nur la flankon de lingva ekzercado. Tre gravas krome, ke ekzistas preciza tempolimigo por grupa laboro, kiu estu anoncita antaŭ la laboro kaj dume: 'Vi havas (ankoraŭ) ... minutojn.' La prezento kaj preparado de rezultoj nepre okazu! Tio povas okazi aŭ denove en la grupoj, aŭ por ĉiuj en pleno (en tutklasa rondo), por montri la rezultojn al la aliaj kaj certigi, ke denove la tuta klaso havu la samajn informojn.

Apliko

- aktivado de antaŭaj scioj
- kuna laborado pri malfacilaj labortaskoj
- interparolo
- pli intensa diskutado
- malkovra lernado
- projektoj
- ludoj

Argumentoj por grupa laboro:

- paroligo kaj aktivigo de pluraj lernantoj samtempe
- lingva kaj socia lernado
- kuraĝigo pri propraj pensoj, ideoj
- kuraĝigo de lernantoj, kiuj timas paroli antaŭ la tuta grupo
- korektado fare de aliaj lernantoj
- gvidado fare de pli bonaj lernantoj
- respondecigo de lernantoj pri sia propra lernado (celoj, rapideco) kaj helpo al aliaj
- sociaj rilatoj kaj grupdinamiko

Argumentoj kontraŭ grupa laboro:

- pli da bruo en la klaso
- eble malfacilas regi la disciplinon
- malfacilas kontroli la lingvouzon (kompreneble en grupoj pli bone eblas, ke la lernantoj erare uzas la cellingvon, aŭ ke ili entute uzas la gepatran lingvon)
- sen sufiĉe bona plano kaj organizado grupa laboro ne tre bone efikas

Mi persone trovas la unuajn tri argumentojn kontraŭ grupa laboro malgravaj kompare al la utilo, kiun ĝi havas. La plej lasta kontraŭargumento tamen havu atenton. Oni devas bone decidi, plani kaj gvidi ĝin (vidu supre la konsilojn). Troa neplanita gruplaboro povas gvidi al kaoso kaj rifuzo, kontraŭe maltrio da grupa laboro en ekstrema okazo regvidas al la instruistcentra alfronta instruado, kiu neglektas kelkajn flankojn de lernado kaj lasas maltrio da spaco por individuoj. Kiel ĉiam, do, meza vojo estas la bona.



6.1.3 Partnera laboro

Karakterizaĵo kaj konsiloj

Ĉi tie du lernantoj laboras kune pri tasko. Partnera laboro estas simila al grupa laboro laŭ la argumentoj por kaj kontraŭ ĝi, sed partnera laboro estas iomete pli facile organizebla.

La interŝanĝo okazas inter du partneroj. Kelkaj grupdinamikaj malfacilaĵoj do forfalas. Samtempe estas verŝajne, ke la lernantoj eĉ pli profitas: ili parolas pli multe dum la ekzercado (praktika lingvouzo laŭ komunikaj bezonoj ja estas la celo de lingvolernado), la pli bona lernanto lernas, ĉar li/ŝi devas klarigi ion, la malpli bona lernanto profitas, ĉar li/ŝi certe lernas ion novan. Parigaj kriterioj povas esti:

- lotumado (bildparoj, vortparoj, puzleroj)
- intereso
- kapabloj, lingvonivelo
- deziro
- proksimeco de sidlokoj

Por la prizorgo de partnera laboro en la klaso, tamen eĉ pli validas, ke la instruisto bone observu, kiel la paroj laboras, kaj kiu bezonas helpon. Li/ŝi devas havi siajn okulojn kaj orelojn ĉie por atenti kaj povi reagi al demandoj.

Apliko

- skribado, ekzercado kaj prezento de dialogoj
- dialogformaj ekzercoj
- ludoj
- taskoj, kiam oni trovu solvon per kuna pripensado (ekz. eraro-korektado)
- aktivado de antaŭaj scioj
- interparolo
- pli intensa diskutado
- malkovra lernado

6.1.4 Individua laboro

Karakterizaĵo

La lernanto laboras sola hejme aŭ ankaŭ en klaso, dum individuaj taskoj. Ankaŭ tiu formo havas sian pravigon: La lernanto povas trakti lernaĵojn vere individue, laŭ sia propra rapideco kaj vidpunkto. Tio signifas, ke li/ŝi tamen konu siajn kutimojn kaj preferojn, kaj sciu pri propraj lernstrategioj. Pro tio oni postulas, ke la lingvoinstruadon eniru ankaŭ elementoj pri lernstiloj, lernstrategioj, tempoorganizado, sentumoj por lerni k.s.

Apliko

- persona mallaŭtlegado
- persona skribado
- ellaboro de personaj pensoj pri temo
- aŭdokompreno
- skribaj ekzercoj kun klaraj solvoj, kiam kuna laboro ŝajnas esti ne pli sukcesa

(BD)

Literaturo: Heyd, Gertraude (1991): Deutsch lehren. Grundwissen für den Unterricht Deutsch als Fremdsprache. [Instrui la germanan lingvon. Bazaj scioj por la instruado de la germana kiel fremda lingvo.] Frankfurt: Diesterweg
Storch, G.(2001): Deutsch als Fremdsprache. Eine Didaktik. [Germana kiel fremda lingvo. Didaktiko.] München: Fink)



6.2 Instruistaj kapabloj konduti en instrusituacioj

Tiun ĉi konsilaron por instruistoj mi trovis en libro pri la instruado de la germana kiel fremda lingvo (vidu la fonton sube). Povas okazi, ke kelkaj aferoj ŝajnas esti memkompreneblaj kaj superflujaj por klarigi. Aliflanke ĝi provas esprimi tion, kio ŝajnas esti tiel malfacile klarebla al ankoraŭ nespertaj instruistoj kaj kion instruemuloj ĉiam plej arde volas ekscii: 'Kiel mi motivigu?'; 'Kiel mi gvidu ekzercadon?'.

Mi ne komentos ĉiun unuopan punkton – estu spaco por propra interpreto. Nek mi rekomendas, ke vi parkerigu tiun ĉi liston. Ĝi montru ekzemplojn de tio, kio eblas. Vidu ĉion en la tuta kunteksto pri tio, kiel lernado funkcias, kaj alproprigu por vi gravajn kaj konvinkajn elementojn iom post iom.

6.2.1 Motivigo

- montri propran pozitivan sintenon al la instruado kaj la lernantoj
- montri kaj nomi la celojn de la instruado
- klarigoj, kial gravas lerni ion (eble iom sekan kaj ŝajne ne tuj 'uzeblan')
- kolekti jam ekzistantajn sciojn
- aktivigi kaj sistemigi konatajn informojn pri la temo
- instigi al demandoj pri la temo
- instigi al grupa cerbumado
- doni superrigardon pri la temo
- plani kune kun la lernantoj la metodon
- komenci per ŝerco
- prezenti kontraŭdirojn kaj provokajn tezojn
- trovi rilaton al aktuala okazaĵo

6.2.2 Reago al lernanto-kontribuoj

En instruado al komencantoj tre gravas, ke la instruisto mem reagu al lernantokontribuoj, ĉar li/ŝi estas *la* sciinto en la klasĉambro. Iom post iom oni povas redoni demandojn al la klaso kaj instigi ankaŭ aliajn lernantojn reagi al kontribuoj de samklasanoj kaj pritaksi ilin.

Gravas krome, ke la instruisto tre koncentrite aŭskultu kontribuojn. Li/ŝi ankaŭ bone konu la lernanton kaj ties nivelon por povi bone taksi la kontribuon, la momentan faron kaj situacion de la lernantoj, por ne eventuale misreagi.

- doni simplan reagon (jes, ĝuste, ne, malĝuste, kapjesi, kapskui)
- doni precizan respondon (jes, tio estas ĝusta, ĉar...)
- doni precizan indikon (rigardu denove la unuan alineon...)
- igi la lernanton precizigi la kontribuon (mi ne ekzakte komprenis, ĉu vi povas ripeti?)
- peti al la lernantoj klarigi la vojon al la solvo
- kuraĝigi al plulernado
- rekoni lernprogreson (jes, ĉi-foje la testrezulto estis multe pli bona)
- rekoni la klopodojn
- doni personan reagon (mi trovis vian kontribuon tre bona, ĉar...)
- resumi la kontribuon
- uzi la respondon por plulaboro (ekz. kiam oni kolektas demandojn, ideojn ktp.)
- diskutigi la kontribuojn



6.2.3 Informiĝi pri lernprogreso dum la instruado

Informiĝi pri la lernprogreso estas grave por konstati, ĉu la lernantoj vere komprenis la novan lernmaterialon.

- ripetigi gravajn ŝtupojn de la lernado
- demandi pri kompreno (analoĝaĵo, interpretado, apliko, analizo, pritakso – ĉi tie eventuale oni klarigu antaŭe la celon de la demandoj, ke ne temas pri kontrolo, sed informado pri la progreso).
- instigi al interrompaj demandoj
- instigi al redemandoj
- instigi al kreado de propraj demandoj / taskoj
- skribe solvigi taskojn / hejmtaskojn
- doni pli da ebloj informiĝi

6.2.4 Ekscii pri antaŭscioj

Baza postulo por aktiva lernado estas, ke vi konstruu novajn sciojn sur jam ekzistantaj scioj. Pro tio ĉiokaze necesas ripeti kaj kolekti la jam ekzistantajn sciojn de la lernantoj. Krome tio necesas, kiam vi havas novan grupon kaj devas taksu ilin kaj komenci la instruadon je iu punkto.

- doni la temon kaj kolekti sciojn
- paroli pri plano (ekz. se oni volas paroli pri temoj kun kelkaj subpunktoj, tiam pli bone oni planu kune la ordon)
- instigi al interparolo en grupoj
- doni temon por pripensi
- starigi malfermitajn demandojn (ekz. interpretado de diskuteblaj bildoj)
- starigi detalajn demandojn (kiam detaloj gravas, kiam oni volas atingi certan temon por plulabori)
- memori pri jam traktitaj punktoj kaj tiel gvidi la interparolon
- kolekti kontribuojn
- diskutigi kontribuojn
- starigi profundigajn demandojn
- redoni demandojn al la grupo
- konservi kontribuojn por postaj klarigoj (se lernanto scias jam tre multe, sed vi volas unue lasi la aliajn malkovri la problemon)
- resumi interparolon

6.2.5 Doni informojn / klarigojn

Unue gravas kompreneble, ke vi mem kiel instruisto komprenu, kion vi volas diri (fakaj scioj); kaj ke tion vi povu klarigi kontentige al la lernantoj (didaktikaj scioj). La klarigoj estu lingve facilaj, logikaj, mallongaj kaj precizaj.

- doni pli ĝeneralan regulon (tio metas la informon en kuntekston)
- akcenti gravajn elementojn (ankaŭ videble per substreko, koloroj, krampoj)
- doni klare videblan superrigardon pri la ordo de unuopaj punktoj (tio faciligas la komprenon kaj memorigon)
- doni ekzemplojn
- igi lernanton mem ripeti informon, per propraj vortoj
- lasi lernanton klarigi
- kompari kun aliaj situacioj
- aplikigi la lernitan aferon
- demandi detale
- peti pri ekzemploj
- difini/difinigi nekonatajn vortojn



6.2.6 Gvidi ekzercadon

Ekzercado okazas en fazoj: **I** klarigi la ekzercon – **II** ekzerci – **III** preparoli la rezultojn. Ekzercojn oni elektu laŭ praktikado kaj uzeblo de la lernmaterialo; laŭ diversaj ekzercoformoj, laŭ malfacileco (tio dependas de la lerngrupo), laŭ la kriterio de variado por vaste ebligi la uzon de la lernmaterialo.

- **I** klarigi ekzercon
 - klarigi la neceson / celon de la ekzerco
 - doni kaj klarigi la taskon (doni regulon, doni ekzemplon, fari kune la unuan frazon, havi klaran taskon)
 - doni tempolimigon (por grupaj ekzercoj)
 - demandi, ĉu la tasko estas klara
- **II** ekzerci
 - observi, ĉu estas malfacilaĵoj
 - konfirmi, ĉu la lernantoj faras la ekzercon ĝuste
 - remontri la taskon
 - helpi kaj instigi al daŭrigo en la sama maniero
- **III** preparoli la rezultojn
 - laŭtlegi la rezultojn
 - mem legi la rezultojn
 - analizi erarojn
 - demandi pri neklaraĵoj
 - korektigi la lernantojn

(BD)

(elektis, esperantigis kaj komentis Birke DOCKHORN; laŭ: Heyd, Gertraude (1991): Deutsch lehren. Grundwissen für den Unterricht Deutsch als Fremdsprache. [Instrui la germanan lingvon. Bazaj scioj por la instruado de la germana kiel fremda lingvo.] Frankfurt: Diesterweg)

Demandoj por diskuto:

1. Kiun instruan formon vi ĝis nun ĉefe uzis: klasan, grupan, partneran?
2. Kiel vi taksas la efikecon de tiuj formoj? Kiujn problemojn/avantaĝojn vi spertis pri ili?
3. Kial grupa kaj partnera laboro aparte utilas por lingvo-instruado?
4. Sekve de ĉi tiu seminario, ĉu vi provos novajn formojn?
5. Kio konvinkis vin ŝanĝi vian uzon de tiuj formoj?



7 Lecion-ideoj

7.1 Modelaj lecionplanoj

Lecionplano helpas al instruisto ordigi siajn intencojn antaŭ la gvido de leciono. Ĝi funkcias kiel kontrol-listo de memorendaj faktoroj kaj helpas vidi la lecionon en pli larĝa kunteksto. Plano povas kovri unu lecionon aŭ unu temon, kiun oni evoluigos tra serio de lecionoj. Lecionplano celas gardi kontraŭ superflua flankeniro de la origina celo de la leciono, kvankam flankeniraj aventuroj povas foje esti fruktodonaj. Lecionplano estu gvidilo kaj helpilo, ne kiraso. Neplenumitaj kaj malsufiĉe plenumitaj partoj de lecionoj povas esti transigitaj al sekva leciono.

Lecionplanoj havas malsimilajn rolojn kaj enhavojn, de unu eduksistemo al alia. Estos interese kompari tiujn. Indas krei modelajn strukturojn specife por Esperantaj lecionoj. Valoros ankaŭ provizi konsulteblan stokejon de veraj lecionplanoj, por doni konvenan bazon aŭ ideojn al kolegoj.

Jen klopodo je strukturo por modela leciono:

=====

Titolo de la leciono:

Celoj de la leciono:

Komunikaj, gramatikaj, fakaj, kulturaj, konduktaĵaj kaj aliaj celoj.

Rilato al studplano:

Se vi instruas en lernejo, vi supozeble faras tion laŭ lerneja, provinca aŭ ŝtat-nivela stud-plano. Eĉ alikaze, vi eble havas stud-planon. Difinu kiel via leciono kontribuas al la plenumo de tiu plano.

Daŭro kaj loko de la leciono:

Ĉu unu leciono aŭ serio; apartaj avantaĝoj aŭ problemoj pro la loko kaj tempo.

Bezonataj helpiloj:

Maŝinoj, bildoj, fizikaj objektoj, kun informoj pri la uzado se aplikebla

Bezonataj antaŭscioj:

Kiujn inform-blokojn aŭ kapablojn vi konsideras necesaj por la sukceso de la leciono, kiuj ne bezonas apartan atenton antaŭ la nuna leciono

Tranktendaj antaŭscioj:

Scioj kaj kapabloj necesaj por la sukceso de la leciono, kiuj bezonas instruadon, reviziadon aŭ ekzercadon antaŭ la nova leciono. Kiam okazos tiuj preparaj agadoj - komence de la leciono aŭ en aparta leciono?



Esperantaj temoj:

Ĉu la leciono enhavas ion pri la Esperanta kulturo aŭ vivo? Ĉu io tia estas konvene aldonebla?

Motivigo kaj varmigo:

Kiun motivigon vi uzos por krei entuziasmon por la nova lernaĵo? Kiam kaj kiel vi kreas tion? Tio povas ligiĝi al la antaŭsciaj agadoj. Foje, klara enkonduka prezento de la nova temo povas esti motiviga, foje la elemento de surprizo pli efikas. Cerbo-varmiga ekzerco preparas la mensojn kaj povas kontribui al la motivigo. Por ampleksa leciono, motivigo povas esti konstruita tra antaŭaj lecionoj. Aliffoje, kvin-minuta enkonduko sufiĉas. Ajnkaze, gravas ke estu motiviga segmento lecion-komence.

Leciona enhavo:

Jen la ĉefa ero. Kreu tempo-skemon por la tuta leciona periodo, inkluzive de la enkonduko, motivigo, kerno kaj konkludo. Kiom da detalo bezonatas dependas je la sperto/lerto de la instruisto. Indiku kiuj instru- kaj lern-teknikoj uziĝos en ĉiu ero. Kiujn aktivecojn vi atendas de la lernantoj?

Konkludo:

Kiel vi konkludos la lecionon, ke la lernantoj klare komprenu kion ili lernis/atingis?

Pritaksaj, firmigaj kaj sekvaj aktivaĵoj:

Kiel vi pritaksos la sukceson de la leciono? Ĉu vi faros tion fine de la leciono aŭ en sekva(j) leciono(j)? Kiuj ekzercoj aŭ aktivaĵoj utilos por firmigi la lernaĵojn aŭ por vastigi iliajn aplikojn al aliaj kampoj? Kiuj novaj lecionoj estas pretigeblaj surbaze de la atingoj de la nuna?

=====

Alternativaj skemoj por lecionplanoj estas bonvenaj.

(SMG)

Demandoj:

- 1) Ĉu vi iam ajn verkis lecionplanon antaŭ ol instrui? Ĉu tio helpis vin pli bone instrui?
- 2) Se ne, ĉu vi estas konvinkebla ke lecion-planoj utilas, kaj ĉu vi ekverkos ilin?
- 3) Se vi ne kredas je tiaj planoj, kion vi uzas anstataŭe por pretigi vin por instruado?



8 Ekzercoj

8.1 Ĝenerale pri lingvoekzercoj

Ekzerco estas lertigo per la praktiko, aktivado kiun oni faras kun la celo plibonigi iujn certajn kapablojn, konojn. Lingvaj ekzercoj servas por plibonigi/aŭtomatigi certajn kapablojn per multfoja ripetado de vortoj aŭ gramatikaj strukturoj en deversaj kontekstoj. Ekzistas multaj grupoj de lingvaj ekzercoj. Oni metas ilin en grupoj laŭ la lingva kapablo, kiun ili trejnas:

1. Aktivaj lingvaj kapabloj: skribado, parolado
2. Pasivaj lingvaj kapabloj: legado, aŭskultado

Kaj laŭ la lingva aspekto, kiun ili trejnas:

1. Prononco kaj intonacio
2. Leksiko (vortoj kaj vortopartoj)
3. Gramatiko

En klasika lingva instruado ekzistas principo de “unu malfacilaĵo en unu tempo” – tio signifas ke en sama ekzerco prefere novaj vortoj estu en konata gramatika konteksto kaj inverse, novaj gramatikaĵoj estu uzataj kun jam konataj vortoj.

Per ekzercoj oni ne nur povas helpi enkonduki novajn vortojn aŭ gramatikaĵojn kaj trejni ilin, sed ankaŭ povas helpi al lernanto enmemorigi ĉion tion. Por atingi tion oni devas sisteme ripeti vortojn kaj gramatikaĵojn en diversaj ekzercoj dum kelkaj sinsekvaj lecionoj. Ekzistas multaj jam pretaj ekzercoj. Instruisto rajtas kaj foje devas ŝanĝi jam pretajn lingvajn ekzercojn por la bezonoj/nivelo de siaj lernantoj. Ekzercoj por memstara lernado havu respondojn (ne tuj videblaj).

(Julinka? Plena nomo?)

8.2 Cel-lingvaj ekzercotipoj

Jen resumo de diversaj ekzerco-tipoj, unuavice skribaj, prezentitaj laŭ alia kriterio ol tiuj prezentitaj supre. Nome, laŭ la grado de strukturiteco, kun la plej aŭtomataj unuaj kaj la plej malfermaj laste. Ĝenerale, sed ne ĉiam, ju pli aŭtomataj estas la ekzerco-formoj, des malpli postulas lingve produktivan plenumon.

8.2.1 Aŭtomataj ekzercoj:

Aŭtomataj ekzercoj estas tiuj, kies respondoj estas evidente pravaj aŭ malpravaj kaj kiuj estas esprimeblaj koncize, se ne per unu litero aŭ cifero, per tipe unu vorto. Sekve, la korektado estas rapida kaj senduba. Ĉi tiu ekzerco-tipo havas krome la avantaĝon, ke ĝi estas facile enkomputiligebla kaj aŭtomate kontrolebla. Plia avantaĝo estas la eblo konstrui la respondojn por liveri kaŝ-frazon, kio donas (almenaŭ al pli junaj lernantoj) plian motivigon kaj ankaŭ eblecon al la plenumanto certigi, ke oni bone respondis. La ĉefa limigo de ĉi tiu ekzerco-tiparo estas la surfaceco de la pridemandeblaj nocioj. Ĝi plej taŭgas testi la scion de klaraj faktoj kaj malpli por testi nuancojn de kompreno, de konkludado aŭ induktado. Ĝi bone taŭgas por testi konon de gramatikaĵoj, por rapide kontroleblaj hejm-taskoj, revizio ks.

Ja eblas uzi kelkajn el la teknikoj por testi pli kompleksajn komprenojn (ekzemple de motivoj, kialoj, manieroj, sekvoj k.s.), sed tio postulas lertan antaŭ-preparadon de la demandoj, por ke ili konformu al la limigoj de la ekzerco-formoj. Aŭtomataj demando-formoj rapidigas la ekzercadon,



permesas rapidan testadon de granda kvanto de sciendaĵoj, kaj donas rimedon okupi grupojn per silenta laboro, per tio liberiganta la instruiston verŝi sian atenton sur difinitan grupon en la klaso. Tamen, necesas limigi ilian uzadon kaj konservi ne-aŭtomatajn ekzerco-tipojn, kiuj postulas plene produktivajn kapablojn kaj kompleksan pensadon.

Vera-malvera:

Jen la plej baza ekzerco-tipo, kun nur du eblecoj, markeblaj per "V" kaj "M", aŭ "A" kaj "B". Ĉi tio povas testi konon de universale konataj faktoj, ekz: "La ĉefurbo de Britio estas Glasgovo", aŭ komprenon de teksto donita, ĉu simpla (ekz: Johano aĉetis kvin pomojn), ĉu pli subtila (Li aĉetis la pomojn ĉar li malsatis), en kiu kazo la kialo ne nepre estis eksplicite donita en la teksto, sed devas esti indukte decidita.

Korekta-malkorekta:

Ĉi tio testas gramatikan konon, kaj taŭgas por kazoj kun nur du eblecoj, ekz. akuzativo/nominativo. pluralo/singularo, -igi/-i aŭ -iĝi/iĝi, kontrasto inter leksike konfuzebaj vort-paroj (rakedo/raketo, trajni/trejni) ktp. Eblas uzi la teknikon por testi kapablon je unu el tiuj punktoj, aŭ pluraj samtempe kiel ekzemple en *La laŭta vekhorloĝo (LLV)*, p. 44, kiu havas la formon de kontinua teksto kun du variaĵoj ene, sed esence estas samspeca kiel la pli lista formo:

La najbaro alvenis kaj diris: "Vi faras (bona laboro/bonan laboron)!"

"Jes," respondis la (laboranto/laboranton): "Mia tegmento nun estas en (bona stato/bonan staton). Mi (riparis/reparis) ĝin. Pluvas ofte kaj estas (necese/necesa) havi bonan tagmenton. Mi iris al la (butikoj/butikojn) (hieraŭ/morgaŭ) kaj mi aĉetis (traboj/trabojn) por la skeleto kaj (tegoloj/tegolojn) por (kovras/kovri) la tuton. Mi laboris dum ok (horoj/horojn) kaj nun ĝi estas (perfekta/perfekte)."

Subite flugis tra la aero subŝipestro, kiu (frapis/falis) la novan tegmenton. En (ĝi/ĝin) nun (troviĝas/trovigas) unu tre granda tru!

Parigado:

Necesas parigi elementojn el du kolumnoj; kutime tiuj en unu kolumno estas indikitaj per ciferoj kaj en la alia per literoj. Ĉi tio bone taŭgas por testi leksikon, kun unuflanke la vortoj kaj aliflanke sed en miksitaj ordo la difinoj, (ekz, *Juna amiko 88/1*, p. 10 pri familiaj rilatoj), gramatikon (ekz. *Tridek roluloj*, p. 35 pri revizio de la demandaj korelativoj), vorto-specrekonon (ekz. *LLV*, p. 37), aŭ komprenon per fraz-duonoj el aŭ pri teksto, kiujn oni devas ĝuste religi (ekz. *LLV*, p. 29).

Ĉi tiu ekzerco-speco estas iom pli postula por la plenumanto, ĉar tiu devas serĉi la ĝustan respondon inter deko da aliaj, kaj zorgi ne uzi respondon dufoje. Ĝi postulas apartan zorgon ankaŭ flanke de la kompilanto, ĉar neniu maldekstraĵo rajtas formi akcepteblan respondon kun pli ol unu dekstraĵo. Precipe en testado de kompreno de teksto, por kiu ĉi tiu ekzerco-formo ankaŭ taŭgas, estas tre malfacile konservi la unikecon de la ĝustaj respondoj: en dek-para ekzerco rajtas ekzisti nur dek akcepteblaj parigoj el la cent teoriaj ebloj, do la kompilanto devas provi ĉiujn el tiuj cent kombinoj kaj konvinkiĝi, ke naŭdek el estas neeblaj. Se unu el ili montriĝas eĉ iom ebla, necesas reformuli unu el la elementoj, sed ĉiu modifo malfermas la riskon de reakceptebligado de naŭ el la malpermesebaj kombinoj. La unikeco de ĝustaj respondoj tre gravas se oni uzas ĉi tiun ekzerco-formon en ekzameno. Se la celo de la ekzerco estas nur trejnado (aŭ amuzo), ne tiom gravas se pli ol unu solvo eblas, tio eĉ donas bazon por grupa diskutado.

Aldono de kaŝ-frazo helpas la lernanton solvi la taskon kaj esti pli certa pri la rezulto, kio povas gravi en kazo, kiam instruista kontrolado ne estas tuj farebla. Sed al ĉi tiu ekzerco-tipo estas granda laboro aldoni kaŝfrazon.

Sekvas ekzemplo de pariga ekzerco pri vortdifinoj el *La laŭta vekhorloĝo ... kaj aliaj atentokaptiloj*, p. 176. Ĝi prezentas kaj testas la malfacilan leksikon el la lasta rakonto "La heroo". Ĝi evitas la problemon, ke unu numeritaĵo povas ligiĝi al pli ol unu literitaĵo. Ĝi ne havas kaŝ-frazon. Kun tiom da elektaĵoj, la ekzerco estas malfacile solvebla. Kun malpli da eroj (ekzemple dek) oni povas malfaciligigi la taskon aldonante du/tri superflujajn neuzendajn (sed kredeblajn) erojn en la dekstra kolumno. Aperis du tiaj ekzercoj, la unua reviziis la substantivojn, la nun ne-substantivojn.

**Pli da vort-difinoj:**

Jen dua listo de malpli facilaj vortoj el la teksto. Ili estas ĉiuj ne-substantivaj! Parigu ilin kun la ĝustaj difinoj en la dekstra listo:

1. abrupte	A: publike deklari.
2. atenci	B: timiga.
3. averti	C: malfacile.
4. daŭre	Ĉ: pensi longe kaj profunde.
5. defii	D: malkonsenti, malakcepti.
6. elĉerpiĝi	E: forte mallaŭdi.
7. entuziasme	F: subite.
8. fandi	G: ĉefe.
9. flosi	Ĝ: fiksi du pecojn de ŝnuro.
10. hasta	H: laŭ regulaj tempo-intervaloj.
11. imuna	Ĥ: kontinue.
12. inspiri	I: ne memori, ne zorgi.
13. insulti	J: finiĝi, ne plu resti.
14. kolizii	J: igi metalon likva per varmigo.
15. kremacii	K: malblovi.
16. mediti	L: maltimi, superi, kontraŭ-agi, spiti.
17. minaca	M: malhelpa, rezista.
18. neglekti	N: rapida, ŭrga.
19. nodi	O: doni informon pri baldaŭa danĝero.
20. obstina	P: nedefektebla, neinfektebla, neatakebla.
21. pene	R: plenigi iun per entuziasino kaj optimismo.
22. potenco	S: iri sen propra forto tra akvo aŭ aero.
23. precipe	Ŝ: frapi forte kontraŭ io; karamboli.
24. proklami	T: inteligenta, cel-trafa, ne-stulta.
25. rifuzi	U: kun granda ĝojo kaj viglo.
26. ritme	Ŭ: bruligi mortan korpon.
27. senco-hava	V: tre forta.
28. suĉi	Z: perforti, ataki.

Multobla elekto (komenca menuo)

Ĉi tiu formo permesas elekton de tri ĝis kutime kvin, sed foje ĝis ok respondoj al demandoj, sed la elekteblaj respondoj restas konstantaj por la tuta ekzerco. Tio taŭgas por testado de gramatiko, kie tipe la nombro de eblaj finaĵoj estas limigita, ekz:

Verbo-tempoj:

-as, -is, -os, -us, -u, -i

Participoj:

-anta, -onta, -inta, -ita, -ata, -ota, -antaj, ktp.

Kaŭzativo/rezultivo:

-i, -iĝi, -igi,

Pluraloj/akuzativoj:

-o, -a, -aj, -oj, -ajn, -ojn.

Similaj prepozicioj:

Pri, por, pro, per, kun...

Multobla elekto (varia menuo):

Ĉi tio estas pli fleksebla variaĵo de la antaŭa ekzerco-tipo, en kiu la nombro de permeseblaj respondoj estas iom pli

limigita (praktike ĝis kvar) sed en kiu vi rajtas ŝangi la proponatajn respondojn por ĉiu demando. La respondojn oni denove per literoj kutimas signi, kaj la demandojn per ciferoj

Oni povas testi leksikon: la demando estas la difino kaj la respondoj kvar simil-sonaj aŭ aspektaj vortoj (ekz. *La unua vekhorlogo*, p. 105 en *LLV*).

- Sovaĝa besto estas _____.
A: feraoca B: fereca C: ferieca Ĉ: feliĉa
- Ron _____ siajn fingrojn kiam li streĉis ilin.
A: eternis B: etendis C: eltenis Ĉ: alternis
- Ron preskaŭ dronis: tio signifas ke li _____ sukcesis savi sin.
A: almenaŭ B: anstataŭ C: ankoraŭ Ĉ: apenaŭ
- Malafabla kaj ironie insulta persono estas _____.
A: impotenta B: impertinenta C: imitinda Ĉ: impulsiva
- Loko, kie oni prilaboras grenon nomiĝas _____.
A: melkejo B: mulejo C: muelejo Ĉ: mielejo



En tiu ekzerco kaŝfrazo estas aldonita, sed ne laŭ la identiga litero de la respondoj, ĉar per nur kvar maleblas konstrui sencohavan frazon, sed per sinsekvigo de difinit-vica litero el la respondovorto, kiu kutime ne estas la unua, ĉar guste la kvar donitaj respondoj prefere simulu unu la alian. Ĉi tiu ekzerco sekve testas ne nur la konon aŭ rekonon de la bezonata vorto, sed la pli subtilan kapablon elekti la ĝustan vorton el inter siaj aspekte parencaj najbaroj, ekz: imposto, imoŝto. importo, impulso; stalo, ŝtalo, stano, ŝtato, stato. Ĝi povas kontrastigi la danĝer-kazojn de enlingva interfero.

Eblas testi la ĝeneralajn sciojn, kaj kaŝi la ekzercon en formo de kvizo. Tiurilate vidu la kvizon en *Juna amiko*, 87/4, pago 16, kie ĉiu respondo estas unuvorta, kaj la identigaj literoj donas kaŝfrazon.

Oni povas prezenti ĉi tiun ekzercotipon (*Unu el kvar*) en tabelo, pli kompakte kaj pli sekveble, kondiĉe ke la respondoj estas tre mallongaj. Tiel eblas prezenti kaŝfrazon pli oportune, en lasta kolumno. Jen komenco de ekzerco akompane al la vidbendo *Pasporto al la Tuta Mondo*, al kiu oni kun nepravigebla bonkoreco aldonis la ĝustajn respondojn.

	Diraĵoj kun mankoj	A	B	C	Ĉ	
1	Kie mia suko? Ĉu vi mem devas kreskigi la ____?	ananasojn	bovinojn	pomojn	oranĝojn	O
2	Vi fariĝis filozofo. Anstataŭ io _____.	intelekta	eksterordinara	normala	serioza	N
3	Diru poste, Helena. ____ bonvolu porti ĉi tiun pleton.	Intertempe	Antaŭtempe	Ĝustatempe	Printempe	I
4	Kaj li nun ŝvitas en plej nigra, plej ____ karceru.	malluma	profunda	luksa	forgesita	P
5	...vi volas ke mi fariĝu ____, kie vi povas sensofiĝi.	dezerto	palm-arbo	kamelo	oazo	O
6	ĉarma sinjorino, kiu ____ pri mankantaj akuzativoj.	ĝojas	aplaŭdas	predikas	verdiktas	V
7	Paciencon, mi petas. Ĉio ____, ĉio. Ho, ve, Georgo...	aranĝiĝos	oranĝ-sukos	kaosiĝos	renversiĝos	A
8	Jes, por liberigi tiun kiun vi ____ akuzis.	prave	kuraĝe	triviale	senkiale	S

Oni povas uzi la teknikon por testi la kapablon apliki la gramatikon al konkreta situacio (ekz. *Ĉe tunelo, ĉevalo* en *LLV*, p. 146, kiu testis la participajn verbo-tempojn en la kunteksto de la donita rakonto). Por testi nur tiun gramatikaĵon, multobla elektado kun komenca menuo sufiĉas, kaj estas eĉ pli kompakta; sed la aldono de tiu kunteksta elemento postulas la transiron al la uzo de varia menuo. Tiu ekzerco montras, cetere, la maksimumon de la eblo krei kaŝfrazon en la kod-literoj, kiuj tiukaze estis A, B, C, Ĉ, D kaj E.: EĈ DECE CEDADA.

Ĉi tiu ekzerco-formo bone taŭgas por testi komprenkapablon de donita rakonto, ĉar la doneblaj respondoj povas esti eĉ tutfrazaj, deduktendaj, kompleksaj ktp. La kompilanto devas zorgi ĉi-kaze pri kelkaj punktoj: la dismeto de la bonaj respondoj devas esti hazarda – nek tro regula, nek tro malregula, la bona respondo ne rajtas evidentigi sin per troa malsimileco al la malbonaj (pro troa longeco, mallongeco, pro alia forma malsameco, ekz. ke la bona respondo komencu per verbo kaj la malbonaj per substantivoj) kaj krome la malbonaj respondoj (forlogiloj) devas kuŝi ene de la komprenkapablo de la uzantoj, kaj esti serioze konsidereblaj kiel alternativoj, elimineblaj nur post iom da pensado. Se la "demando" ne estas en demanda formo, sed havas la formon de kompletigenda frazo, ĉiuj el la proponataj respondoj devas taŭge sekvi kaj kompletigi la fraz-komencon, el gramatika vidpunkto. Foje oni malrespektas la supre donitan regulon pri seriozecon de la forlogilo, kaj aldonas malpli seriozan sed amuzan forlogilan respondon, por rekapti la atenton kaj intereson de la plenumanto, kiu povas forvagi dum ĉi tiuj aŭtomataj rutinecaj ekzercoj.

Taŭgiga ekzerco

En ĉi tiu tipo oni donas frazon kun spacoj, kaj post ĝi iun elementon, kiun oni devas iel taŭgigi laŭ limigita nombro de eblecoj por enmeti en la spacoj. Ekzemplo estas en *Tridek roluloj*, p. 54, (fragmento sube) kie oni traktas la maltransitivigon de verboj per **-iĝ-**, sed kiu prezentas la duan paŝon, en kiu oni ne nur ekzercas la teknikon fari tion, sed esploras, ĉu la plenumanto komprenas kiam tiu **-iĝ-**igo de la verbo necesas, alivorte, senti la transitivecon aŭ netransitivecon de la prezentitaj verboj.



La ekzerco uzas ĉiam du spacojn, kaj necesas zorgi, ne nur miksi la lokon de la iĝ-verbo (kelkfoje en la unua loko, kelkfoje en la dua) sed aldoni frazojn en kiuj ĉu ambaŭ, ĉu neniuj el la aldonendaj verboj estas -iĝ-igendaj. Sekve, kvankam gramatike estas nur du eblecoj, tiu unu aldonita elemento kapablas generi kvar respondvicojn : el kiu nur unu gustas, t.e. la ebleco trafi la ĝustan respondon hazarde estas malpliigita gis akceptebla nivelo:

Adaptu la interkrampan verbon, por ke ĝi eniru la spacojn. Foje vi devas aldoni “-iĝ-, foje ne:

1. Kie _____ la banko? Mi ne povas _____ ĝin. (trov-)
 2. Ni _____ la planon, ĉar baldaŭ la vetero _____. (ŝanĝ-)
 3. Ni tuj _____ la diskuton, alie ni ne scios, kiel ĝi _____ (fin-)
 4. Ĉu matematiko _____ vin? Mi ne _____. (konfuz-)
 5. Mi _____ biciklon, kaj biciklon mi ĉiam intencas _____. (uz-)
- ...ktp.

La ekzerco-formon oni povas uzi ankaŭ kun pli ol du taŭgigaj eblecoj, ekzemple ĉe verbo-tempoj -as, -is, -os, -u, -i.

Misviculo

En ĉi tiu amuza ekzerco-formo oni donas serion de vortoj, en kiuj ĉiuj krom unu estas sence, forme aŭ gramatike ligitaj. La plenumanto devas decidi, kiu estas la misviculo. Do, ĝi ne nur testas konon de la leksiko, sed postulas plie logikan rezonadon. Komence oni prefere prezentu nur unu kriterion por la komparado, verŝajne la sencan. Poste oni povas prezenti pli komplikajn ekzercojn (ekzemple *La unua vekhorloĝo* en *LLV*₂ p. 148) kie ne nur la kriterio multe varias, sed la kialo povas igi tre subtila. Problemo unuavice de ĉi tiu ekzerco-formo estas la multeco de uzeblaj kriterioj, tiel ke lerta studento povas per torda logiko pravigi elekton de preskaŭ iu ajn el la prezentitaj vortoj. Kaŝfrazo povas tamen redirekti la studenton al la "misviculo", kiun celis la preparinto. Ĉi tiu ekzerco-formo (kiel multaj) estas du-nivele ekspluetebla – kaj aŭtomate (en kiu gravas nur elekti la ĝustan respondon) – kaj produktive, se oni donas la aldonan taskon post la elektado klarigi la malsamecon de la "misviculo". Tiukaze, la ebleco de pli ol unu bona respondo ne plu ĝenas, kaj estas eĉ ekspluetebla por diskuti, kiuj el la konkurencaj logikoj estas pli logika.

Serioj:

Ĉi tiu ekzerco-formo taŭgas por firmigi la konon de fermitaj serioj lernendaj frue en la kurso (monatoj, tagoj, sezonoj, kompas-direktoj ktp.) kaj estas suplementeblaj per simplaj aritmetikaj serioj, kiuj firmigas la manipuladojn de la ciferoj. Ekzemplo troviĝas en *La laŭta vekhorloĝo*, p. 42.

Reordigo:

Ĉi tiu tipo taŭgas por revizii la tutecan komprenon de legita teksto aŭ spektita vidbendo, kaj precipe taŭgas se tiu fonto havas serian aŭ epizodan karakteron. Oni resumas la rakonton en ne pli ol dudek frazoj (kiuj povas esti rekte prenitaj el la rakonto, aŭ kiuj pli bone resumas ĝin, ne estintaj mem en la origina verko). Poste oni miksas la ordon de tiuj frazoj kaj la plenumanto devas reordigi ilin. Tio bezonas multan pensadon, kaj la kapablon ne nur kompreni la frazojn, sed memori kaj uzi tiun komprenon. Ekzemploj troviĝas fine de *LLV*₁ p. 50, fine de *Frapo ĉe la pordo*. p.54 en *Pordoj*, kaj en la pasport-vidbendaj ekzercoj.

Ekzerco-verkinto povas prijuĝi la malfacilecon de la ekzerco, provante mem solvi ĝin tri monatojn post la verkado. Simpligaj teknikoj estas krei du ekzercojn el unu: dek frazoj pri la unua parto de la rakonto kaj dek pri la dua parto, anstataŭ dudek-demanda kap-rompaĵo. Alia tekniko estas jam loki ĉiun trian aŭ kvaran frazon en la ĝusta loko.



KREVO-versoj

Ĉi tiuj prezentigas en la formo de duliniaj versaĉoj, kies lastan vorton forŝtelis la agentoj de kultur-protekta organizaĵo "KREVO". La plenumanto havas la taskon reenskribi la mankantan vorton, helpata de la senco de la poemo, kaj de ia forma simileco kun la lasta vorto en la linio supre. Ekzemplojn trovi en *TR*, p. 64, *Pordoj*, p. 55, *LLV*, p. 42 kaj *La heroo*. en *LLV*, p. 179:

Iu kriis dum la dramo,
"Ne batalu en la _____"

Se brilas la suno, se belas la tago
Ni promenas en parko; ni naĝas en _____.

Por viziti kinejon, necesas aĉeto
De papera peceto, multkosta _____.

Ni butikumis meze de Parizo,
Sed vidu la prezojn! Kia _____.

Ne sidu ekstere, froste sur seĝo,
Jam nun falas pluvo, sekvos eĉ _____.

Ligu triojn:

Jen ekzerco-tipo simila al parigo, sed en kiu oni devas ligi triojn. Tipa ekzemplo aperis en la ekzercaro por la lasta ĉapitro de la vidbendo *Pasporto al la Tuta Mondo*. La bendo havis siajn proprajn rolulojn kaj la ekzerco resumas konon de ili. Sed la bendo entenis aludojn al famaj esperantistoj, kaj la ekzerco sekve testas memoron ankaŭ de tio:

Personoj, profesioj, plenumoj

Jen dek sep homoj el la bendo; kelkaj vivas nur en la bendo, aliaj vivas aŭ vivis ankaŭ en la reala mondo. Sed la fantoma malordigisto misordigis kolumnojn 2 kaj 3. Reordigu ilin!

<u>Aganto</u>	<u>Alvokiĝo</u>	<u>Ago</u>
1. Aziz	greka filozofo	Intervjuis homojn ofte.
2. Baghy	brita poetino	Verkis la poemon <i>Miozotoj</i> .
3. Barbulo	belg-svisa verkisto	Enamiĝas al Nov-Zelandanoj.
4. Bardo	juĝistino	Fariĝis viktimo de krimo en la kafejo.
5. Boulton	pola okulisto	Verkis la libron <i>Streĉita kordo</i> .
6. Filisa	impost-inspektoro	Verkis la romanon <i>Ĉu li bremsis sufiĉe?</i>
7. Flora	kurinto kaj verkisto	Vendis biletojn al Nov-Zelando.
8. Georgo	ŝafisto	Foriris al Japanio.
9. Helena	hungara poeto	Verkis Esperanton.
10. Jolanda	baleta dancistino	Verkis poemon al la doktoro.
11. Kalocsay	bilet-vendisto	Verkis la libron <i>Faktoj kaj Fantazioj</i> .
12. Karlo	ĉeĥa poetino	Trovis Azizon kaj revivigis lin.
13. Ken	ŝafisto kaj kantisto	Reiris al Nov-Zelando.
14. Piron	skulptistino	Verkis la poemon <i>Sonĝe sub pomarbo</i> .
15. Ruselo	vendistino	Estas konstante konfuzita.
16. Urbanova	raportisto	Bakis tro avangardan kukon.
17. Zamenhof	hungara verkisto	Kantis pri espero en prizono.



Litero-miksoj:

Oni prezentas vortojn el legaĵo kun miksitaj literoj. Oni devas malmiksi la literojn, kaj eltrovi la vortojn. Oni skribu ilin kun la literoj en la kvadratoj aŭ en la cirkloj. Ĉar ni ne havas rakonton, kaj ĉi tiu liter-mikso estis verkita ekskluzive por ĉi tiu manlibro (dum teda kunsido), ni aldonas help-difinojn por la miksitaj vortoj. Fine oni prenas la literojn el la cirkloj por krei sube sekretan vorton aŭ frazon, kiu prefere estu sprita aŭ vortluda.

Vojaĝanto	R U S T I T O	○ ○ ○ □ □ □ □
Okulparto	T O N E R I	□ □ □ ○ ○ □
Regiono	R I T O I R O T E	○ ○ ○ □ □ □ □ □ □
Birdejo	O S T E N	○ □ ○ □ ○
Cirkulo	K A T A R O B O	□ □ □ □ □ □ ○ ○

Nun, prenu la literojn el la cirkloj kaj re-aranĝu ilin por trovi la sekretan vorton: Kio servas se oni volas kaŭzi lavangon da lernado?



(PS: Help-indiko kaj kontrolilo, ĉu oni ĝuste respondis: Kio pagendas por lui grandan senflugokapablan femalan birdon?)

8.2.2 Duon-aŭtomataj ekzercoj

Ĉi tiuj ekzercoj postulas mallongajn respondojn. eble nur kelk-vortajn, sed iliaj formoj ne estas tute fiksitaj; pli ol unu respondo povas esti ĝusta. Sed ĉar la tasko estas iom difinita, la eblecoj por respondi ne estas senfinaj, kaj la respondoj estas iom rapide korekteblaj. Ili estas kaj skribe kaj parole plenumoblaj.

Kompletigu la frazon

La kompletigo povas postuli nur unu vorton; tiukaze la ekzerco estas aŭtomata, sed kutime ĝi postulas kelkajn vortojn, kiuj ne estas rekreblaj el la unua parto de la frazo. Taŭgaj vortoj por fini la fraz-komencon estas *kiam, ĉar, pri, pro, per, kun* ktp. Ekzemplo: *Tridek roluloj*, p.17 kaj 38.

Fraz-generilo:

Ĉi tio uzas la simplan ekzerco-tipon, sed apartigas tiujn lastajn ligvortojn disde la ceteraj fraz-komencoj. Do, se la ekzerco prezentas dek fraz-komencojn, kune kun dek ligvortoj, oni povas per ĉiuj kombinoj generi cent finendajn frazojn. La kompilanto devas tamen zorge prepari kaj testi la ekzercon, por certigi, ke kombinoj liveru sencohave fineblajn frazojn. Ekzemplo estas en *Pordoj* p.53, *Tridek roluloj*, p. 50.

Modifaj ekzercoj

Ĉi tiuj ekzercoj celas firmigi la kapablon ŝanĝi unu strukturon en alian, kaj estas uzeblaj por plej diversaj gramatikaĵoj: komparacio (*Pordoj* p.15), de transitiva al netransitiva verbo (*Tridek roluloj*, p. 38 kaj *LLV*, p.47), kreo de -iĝ-formoj el verboj aŭ adjektivoj (*Tridek roluloj*, p. 50), kaj nia lasta ekzemplo montras, kiel oni povas postuli plurajn transformojn de la samaj frazetoj: el prezenca verbo kreu la ordonon, la demandon, la negativon, la futuron, la pasintecon (*Tridek roluloj*, p. 17):



Bazaj frazoj:

- 1. Li iras kun ni
- 2. Ili staras apud mi.
- 3. Ŝi reiras al la urbo.
- 4. Mi helpas.
- 5. Ili vernas per buso.
- 6. Ŝi skribas per kraĵono.

Taskoj:

- 1. Faru demandojn, ekz. Ĉu li iras kun ni?
- 2. Faru la negativon, ekz. Ili ne staras apud mi.
- 3. Faru la negativan ordonon: ekz. Ne reiru al la urbo.
- 4. Petu tre afable: ekz. Fakte, ni preferus, se vi bonvolus ne skribi per kraĵono.
Ktp.

Tiu (kaj la sekva) estas iom malnovmodaj ekzerco-tipoj (strukturismaj); ne tro uzu ilin, nur prepare al ekzercado en situacioj.

Evoluigaj serioj

Ĉi tiuj estas specoj de transformo, sed la transformenda elemento varias. Ĝi fakte estas speco de programita lernado, aŭtomata en la senco, ke la plenumanto povas tuj kontroli la ĝustecon de sia respondo antaŭ ol pluri, sed ne tute aŭtomata pro tio, ke la respondo estas tutfrazo. Oni ricevas serion de similaj frazoj unu sub la alia. Ĉiujn krom la plej supra oni devas kovri per kartonpeco. Fine de tiu frazo staras interkrampe vorto, kiu signalas la bezonatan transformon. La plenumanto rediras la frazon ŝanĝanta tiun petitan elementon, kaj per mallevo de la kartonpeco je unu linio povas kontroli mem la ĝustecon de la respondo kaj jam trovi la indikon, lau kiu necesas modifi la duan frazon. Plenumanto povas dum memlernado testi sin, kaj kontroli kiomlonge necesas, por tralabori la tutan ekzercon. Ekzemploj estas en *Tridek roluloj*, p. 62 (fragmento sube), *LLV*, p.40, kaj kun iom alia metodo en besta kunteksto en *Juna amiko* 88/2, p.12. [Vi klare konstatas, ke ĉi tiu teksto estas malnove verkita – aperis en IPR antaŭ 1990 – intertempe komputiloj forigas la neceson kaŝi paperojn per kartonpecoj].

- | | |
|---|------------------|
| Dek kvar serpentoj kuŝas en la bankuvo. | Dek du... |
| Dek du serpentoj kuŝas en la bankuvo. | ...elefantoj... |
| Dek du elefantoj kuŝas en la bankuvo. | ...saltas el... |
| Dek du elefantoj saltas el la bankuvo. | ...besto-ĝardeno |
- Ktp.

Starigo de kunteksto

Por ekzerci la regon de iuj gramatikaj funkcioj nur cel-lingve, kaj ne postulante tradukon el nacia lingvo, oni plej ofte devas difini iun kuntekston. Tio povas veni el iu verko, kiun la ekzerco suplementas, aŭ povas difini propran kuntekston, ene de kiu oni devas respondi konvene. La sekva ekzemplo estas hibrido. Ĝi estis verkita por suplementi la vidbendon *Pasporto al la Tuta Mondo*, sed per kunteksto ekster la bendaj okazaĵoj. La uzantoj de tiu bendo ricevis ekzercojn kiuj ekzercigas la gramatikaĵojn (ĉi-kaze participojn) uzante la rolulojn kaj eventojn de la bendo. Tiuj ekzercoj plej konvenas unue, ĉar oni povas ilin plenumi kun helpo de propra memoro. Dua paŝo estas plenumi ekzercojn kiuj testas kapablon regi la gramatikaĵon en alia kunteksto. Jen la ekzemplo:

**Pasporto al la Tuta Mondo – Lecionoj 13-15. Ekzerco pri participoj****La familia tago**

Jen programo de familio tra unu tipa labor-tago. Rigardu ĝin kaj respondu la demandojn fine.

Horo		Panjo	Paĉjo	Infano	Bebo
07.00 7 atm		Organizas ĉiun.	Foriras, vojaĝas al laborejo.	Foriras, iras al lernejo.	Vekas la familion.
08.00 8 atm		Preparas matenmanĝon.	Alvenas kaj legas ret-poŝton.	Leciono 1: Lingvo.	Matenmanĝas.
09.00 9 atm		Polvo-suĉas. Falas sur lud-briko.	Respondas ret-poŝton.	Leciono 2: Matematiko.	Ludas per brikoj.
10.00 10 atm		Bandaĝas piedon, promenas kun bebo.	Legas raportojn.	Leciono 3: Muziko.	Ploras, promenas kun Panjo.
11.00 11 atm		Tagmanĝas kaj lavas telerojn.	Verkas raporton.	Leciono 4: Biologio.	Tagmanĝas kaj ĝenas.
12.00 Tagmeze		Provas endormigi bebon.	Labora tagmanĝo.	Tagmanĝo en lernejo.	Bruas.
13.00 1 ptm		Lavas vestaĵojn.	Prezentas raporton en kunsido.	Leciono 5: Desegnado.	Dormas.
14.00 2 ptm		Bakas kukon.	Dormas en kunsido.	Leciono 6: Sporto.	Vekiĝas, ploras.
15.00 3 ptm		Kantas por bebo.	Vekiĝas, trinkas kafon.	Vizitas butikum-centron kun amikoj.	Manĝas kukon. Aŭskultas kanton.
16.00 4 ptm		Demandas al infano: “Kie vi restis tiom longe?”	Ordigas labor-tablon, forviŝas ret-mesaĝojn.	Venas hejmen. Respondas: “Mi studis kun amikoj.”	Ludas per pupoj.
17.00 5 ptm		Kuiras vespermanĝon.	Vojaĝas hejmen.	Rigardas televidon.	Manĝas vespermanĝon.
18.00 6 ptm		Krias al infanoj, elŝaltas televidon.	Alvenas. Helpas kun hejmtaskoj.	Faras hejmtaskojn kun helpo de Paĉjo.	Ludas per fluto.
19.00 7 ptm		Lavas telerojn.	Manĝas vespermanĝon. Legas al bebo.	Forigas la erarojn de Paĉjo el la hejmtasko.	Aŭskultas rakonton de Paĉjo.
20.00 8 ptm		Telefonas al amikinoj.	Rigardas televidon ĉar komputilo estas okupata.	Krozadas en la komputila reto.	Rifuzas endormiĝi.
21.00 9 ptm		Endormigas bebon. Sendas infanon litten. Mem endormiĝas je 21.40	Endormiĝas je 21.05 antaŭ la televidilo.	Krozadas. Decidas paki lernejo-tekon morgaŭ. Endormiĝas je 21.50	Finfine endormiĝas je 21.59.



Kompletigu la frazojn:

1. Kiam Panjo preparis la matenmanĝon, Infano estis forir ___ al la lernejo kaj Bebo estis lud ___ per brikoj.
2. Kiam Paĉjo prezentis sian raporton, Infano estis ir ___ al sporta leciono kaj ir ___ al muzika leciono.
3. Kiam Panjo bakis kukon, Paĉjo estis ___ en kunsido kaj lia raporto estis verk ___ kaj prezent ___.
4. Kiam Infano krozis komputile, Panjo estis lav ___ la telerojn kaj endormig ___ la bebon.
5. Kiam Infano rigardas televidon, tiu estis vizit ___ la butikum-centron, sed la hejm-tasko restis far ___.
6. Panjo estis kant ___ por Bebo kaj Infano estis desegn ___ kiam Paĉjo viŝis ret-mesaĝojn.
7. Kiam Panjo bandaĝis sian piedon, Infano estis sid ___ en muzika leciono, kaj la raporto de Paĉjo estis verk ___.
8. Kiam Paĉjo trinkis kafon, Bebo estis aŭskult ___ k ___ on, Infano estis rigard ___ t ___ on kaj Panjo estis kuir ___ v ___ on.
9. Je 21.35 ___ kaj ___ estis endormiĝintaj, sed ___ kaj ___ estis endormiĝontaj.

Jam temp' esta:

1. Estas 7.40.

Matenmanĝo estas ____, Paĉjo estas forir ____ kaj alven ____ al la laborejo.

2. Estas 11.30.

Infano estas stud ___ biologion, Bebo estas bru ___ kaj la raporto de Paĉjo _____

3. Estas 16.15.

La kuko estas ___ kaj _____. Bebo _____ per pupoj. Vestaĵoj _____.

4. Estas 20.30.

Pajno estas _____ al _____, la hejmtaskaj eraroj _____, kaj Infano _____ en la _____ reto.

5. Estas 10.30.

Infano estas studanta _____, studinta _____ kaj _____, studonta _____ kaj vizitonta lecionon pri _____.

6. Estas 13.30.

Infano estas lud ___ per _____ kaj lud ___ per _____ kaj _____. Nun Bebo estas _____

7. Estas 12.05.

Infano estas _____ anta, Bebo estas _____ onta kaj Paĉjo estas _____ inta.

8. Estas 15.20.

_____ estas _____ ita, _____ estas _____ ata kaj _____ estas _____ ota.

9. Estas 21.58.

Nur... , ĉar...

Starigu multajn demandojn kaj ekzercojn pri la familio, similaj al niaj. Kreu proprajn tagajn skemojn kaj elpensu demandojn, ekzercojn kaj ludojn pri ili.

8.2.3 Ne-aŭtomataj ekzercoj

Ĉi tiuj bezonas plenfrazajn respondojn, aŭ eĉ la kapablon formuli kaj komuniki kompleksajn nociojn. Ili povas preni demandan formon, ĉu pri rakonto, ĉu pri la vivo de la plenumanto, ĉu pri ĝenerale konataj temoj. Iuj demandoj estas pli simple respondeblaj ol aliaj, tiujn ni uzu frue en la kurso aŭ komence en la ekzerco. Tipaj demando-vortoj estas "Kio", "Kiu", "Ĉu", "Kiom da", "Kie" ktp. Tiukaze la granda plimulto de la respondo estas jam trovebla en la demando, la plenumanto devas kutime aldoni nur unu vorton da freŝaj informoj. Pli postulaj estas la demandoj pri motivo, maniero,



komparoj, induktendaĵoj, supozoj ks. Tiukaze la demando donas nur etan parton de la respondo; la plenumanto devas efektive elkovi el sia lingvo-scio la elementojn por formi la respondon. Tre produktivaj estas demandoj starigitaj per "Kiel", "Kial" _ "Se X_ kion vi farus?" aŭ "Se Y. kiel vi sentus" aŭ "Se okazis Z kaj vi estus A, kiel vi reagus?" ktp. Aldone al tiuj eblecoj starigi demandojn, estas aliaj ekzerco-formoj:

Diversaj utilaj formuloj:

Por kio oni uzas ...? (*LLV*, p.40) Kial famiĝis ...? (*LLV*, p.38) Kiel funkcias ...? (*LLV*, p. 183) Klarigu la signifon de ... (*LLV*, p. 31) Kio estas la diferenco inter X kaj Y? Kio estas la simileco inter X kaj Y? (*Pordoj*, p. 53), Ĉu oni povas inventi X, sen inventi Y? (*La unua vekhorloĝo* en *LLV*, p. 94) kaj samloke "Kiuj estas la dek plej gravaj inventaĵoj el la homa historio?" kiun oni devas decidi unuope, poste diskuti pare kaj fine decidi tutgrupe.

Ruzaj respondoj:

Ĉi tio estas iom ludeca ekzerco, kiu postulas multan fantazion. Oni ricevas demandon respondendan per iom da frazoj. Post ĝi aperas du aŭ tri radikoj, ne nepre rekte ligitaj al la temo de la demando. La plenumanto devas respondi la demandon uzanta tiujn radikojn. Vidu *TR*, p.51.

Bild-priskribo:

Eblas plenumi ĉi tion skribe aŭ parole, unuope aŭ grupe. La bildoj havu dinamikan aŭ serian enhavon, ne nur priskriban. Ekzemple la kvar bildoj en serio en *Juna amiko*, p87/3, p. 24. Simile la kvar kovrilaj bildoj de la jarkolekto 1988 de *Juna amiko* estas priskribeblaj, sed tiukaze la tasko estas strukturita per demandoj. La bildoj estas ĉiuj dupartaj, kaj la dua, komence kaŝita parto prezentas iun surprizon aŭ evoluon neatenditan el la unua bildo. Bonega ekzerco estas formebla el la desegnaĵa bazo de bildstrio, t.e. la desegnaĵoj kun la parol- kaj pens-bobeloj, sed sen la teksto. La plenumantoj devas laŭ la bildoj imagi la rakonton kaj dialogon. Kelkaj plenumantoj laborantaj sendepende kapablas krei malsamajn rakontojn laŭ la samaj bildoj. Tion pruvis utiligo de la bazo de la bildstrio "La domo kun oraj fenestroj" (*Juna amiko* 88/3). [Pli moderna versio estas rigardi televidan sap-operon – ju pli vaku-enhava des pli bona – mutigi la sonon, kaj en real-tempo, kursanoj prenu rolojn kaj aldonu propran dialogon. *Karaoke* sen la muziko.]

Rol-prenoj:

Ĉi tiuj estas antaŭpreparaj paŝoj por la plenumo de formalaj rol-ludo] (vidu *IPR* 88/1) Oni ricevas situacion simplan, kiun oni devas enscenigi ("Iu forgesis ion" en *Juna amiko* 88/2, p.7) aŭ en kiu oni prenas rolon kaj devas ion demandi, peti, klarigi aŭ postuli de iu alia, ekzemple laŭ la situacio de legita rakonto (*Pordoj*, p. 75 kaj *LLV*, p. 183).

Eseo:

Ĉi tio donas preskau senliman eblecon por esprimado, ĉu fakte, fikcie, serioze, leĝere. Pri tiu lasta ekzemplo troveblas en *Pordoj* sur paĝo 78 kaj en *LLV*, p. 31 kaj 48.

Jen ni skizis gamon da eblaj ekzerco-formoj, per kiuj la instruado povas esti varie kaj sen uzo de nacia lingvo ekzercata, de la plej simplaj "Jes/Ne" tipoj, ĝis la plej kreivaj kaj postulaj.

(SMG)

8.3 Lingvaj ludoj

8.3.1 Lernado havas tri fazojn:

1. prezentado de la nova lingva materialo
2. duonscio (jam scias pri ekzisto de la vorto aŭ gramatika regulo, sed ne jam povas aktive uzi)
3. trejniĝo



Ludoj kutime estas uzataj en la 3a fazo, por igi lernantojn multfoje uzi novajn vortojn kaj gramatikajn strukturojn en diversaj (proksimaj al vivo) situacioj.

8.3.2 Trajtoj de ludoj

Ludo devas:

1. havi regulojn kaj kriteriojn por gajni, kiujn gvidanto anoncu antaŭ la ludo
2. esti emocie valora (enhavi elementon de konkurenco)
3. esti amuza

8.3.3 Tipoj de ludoj

1. por konkurenci kaj esti unua (persone aŭ kiel grupo)
2. por kunlabori kun aliaj por atingi komunan celon
3. rol-ludo - artefarita imitado de iu situacio, kie ĉiu ricevas rolon kaj devas agi ene de sia rolo

Ekzemplo de rol-ludo:

Ĉiuj 4 lernantoj formas unun familion, ĉiu ricevas karton kun priskribo de sia rolo. La familio havas 20 minutojn por decidi kien ili veturos por longa semajnfino (3 tagoj, semajnfino plus unu tago – ŝtata festo).

Patro Jan (52) – volas ŝpari monon kaj tial preferas veturi al proksima loko per aŭto.

Filino Karin (14) – volas al konkreta fora urbo por la koncerto de sia ŝatata grupo

Filo Aleks (12) – volas resti en hejma urbo, ĉe sia amiko por kune kun li ludi komputilajn ludojn

Avino Flavija (80) – volas al varma lando, kun ebleco tie ĉiutage ricevi masaĝon kaj ne zorgi pri kuirado kaj lavado de teleroj.

Post la ludo unu el familianoj informas la tutan grupon (aliajn familiojn) pri la diskuto kaj ĉu estis atingita la decido.

Ekzemplo de rol-ludo:

Kvar lernantoj formas registraron de la malgranda urbo. Urbo ricevis 100 000 eŭrojn kaj 4 ministroj devas decidi kiel plej bonas uzi la monon. Lernantoj havas 25 min.

Ministro pri ekologio – nepre ne volas ke estu investoj en konstruado de novaj aŭto-vojoj, ne havas konkretajn projektojn

Ministro pri sano – volas senpagigi vizitojn al dent-kuracistoj por infanoj ĝis 16 jaraj (laŭ li tio ŝparas estonte kostojn, estos malpli da dent-problemoj ĉe plenkreskuloj).

Ministro pri edukado – ne havas konkretajn proponoj pri investoj, sed volas ke en lernejoj estu nova fako: profesia orientiĝo – homoj de diversaj profesioj venu al lernejoj por rakonti pri siaj profesioj.

Ministro pri trafiko – volas konstrui novan vojon, por pli rapida transportado de infanoj el vilaĝoj al urbaj lernejoj, kaj por pli da profito por lokaj enterprenoj.

Post la ludo unu el la ministroj informas la tutan grupon pri la diskuto kaj ĉu estis atingita la decido pri budĝeto. Fakte, en tiuj ĉi konkretaj ludoj lernantoj povas ne atingi celon, sed por la lern-procezo pli gravas ke ili aktive parolu, ol atingi finan decidon.

8.3.4 Komunikadaj kaj lingvistikaj ludoj

Komunikadaj ludoj celas trejni ne-preparitan komunikadon, por atingi celon (ne kontroliĝas korekteco de la lingvo-uzo, sed la plenumado de la tasko).

Ekzemplo:

Ĉiu lernanto ricevas bildon, ĉiu bildo havu du ekzemplerojn, plej facilas aĉeti du revuojn kaj eltranĉi de tie samajn bildojn. Lernantoj ne montrante unu al la alia bildojn, nur priskribante ilin, devas trovi la homon kun la sama bildo. Gajnas tiu paro kiu plej rapide kaj ĝuste plenumis taskon. Bildoj povas



“subteni” la temon de la leciono, ekzemple por la temo “korporpartoj” la bildoj povas esti fotoj de homoj, same kiel por la temo “vestaĵoj” ks.

Lingvistikaj ludoj servas por trejni novajn vortojn aŭ gramatikon; kontroliĝas korekteco de la lingvo.

Ekzemplo:

Sur la listo de ĉiu ludanto estas du kolumnoj, en unua substantivoj, en alia verboj, ludantoj devas por ĉiu substantivo trovi unu taŭgan verbon kaj fari frazon en pasinta tempo pri sia najbaro kaj ne forgesi pri akuzativo. Gajnas tiu, kiu plej rapide kaj ĝuste faris la taskon.

Dentoj
 brosi
Lakto
 trinki
Libro
 legi
Televidilo
 regardi
Ungoj
 tranĉi
(miksi vortojn)

Ekzemplo:

Skribi sur du listoj 10 samajn vortojn, faritaj el konataj radikoj kaj sufiksoj, distranĉi ilin je partoj po 3 literoj kaj miksi. Lernantojn disdividu en du teamojn kaj donu la taskon konstrui 10 vortojn. La teamo, kiu unue faros – gajnos. (foje povas okazi, ke la teamo faros aliajn vortojn ol estis unue, sed tio ne estu problemo, se ĉiuj vorto-partoj estis uzitaj.)

8.3.5 Rolo de instruisto dum rol-ludoj kaj komunikad-ludoj

1. Ne rajtas korekti lingvan uzadon dum la ludo mem, devas skribi siajn rimarkojn sur papero kaj post ludo analizi erarojn.
2. Devas helpi dum la ludo per aldona informo
3. Devas aktivigi pasivajn ludantojn (per demandoj)

(verkinto?)

Prezentu:

Estu preta prezenti unu ludon kiun vi partoprenis aŭ gvidis sukcese. La prezento povos esti teoria, kun indiko kiujn lingvajn aŭ aliajn kapablojn ĝi celas evoluigi, aŭ povos esti praktika, ke vi gvidu la ludon en la seminario.

Diskutu:

Ĉu estas kazoj kiam tamen gvidanto de ludo intervenu pro lingvaj eraroj? En kiaj kazoj kaj kiel oni faru?

Diskutu pri rol-ludoj:

- 1) Rakontu viajn personajn spertojn gvidi aŭ partopreni en rol-ludoj.
- 2) En kiuj cirkonstancoj rol-ludoj povas esti malkonvenaj aŭ ne atingi la deziratan celon?
- 3) Kiujn valorojn kaj utilon vi rajtas atendi de rol-ludado?
- 4) Kiuj estas la ĉefaj punktoj kaj principoj kiujn gvidanto de rol-ludo devas atenti?



9 Ekzamensistemoj

Ekzamenoj por la unuopulo konfirmas la atingon de difinita nivelo de lingvo-kapablo, kaj provizas motivigon levi sian nivelon, ne nur por la teoria atingo, sed por altigi la kvaliton de transnaciaj kontaktoj fareblaj pere de la lingvo. Por la komunumo, ekzamenoj havas stabiligan influon, tenante la lingvo-konon kaj -uzon unueca, kaj donante defion al komunumanoj pli bone koni la kulturajn, historiajn kaj literaturajn ecojn de la grupo al kiu oni apartenas.

Multaj landaj asocioj havas proprajn ekzamenajn sistemojn, plejparte dulingvajn. Ni traktos sekve la internaciajn ekzamenojn je dispono, kiuj estas kompreneble, pure Esperant-lingvaj.

(SMG)

9.1 Ekzamensistemo de UEA kaj ILEI

Dum multaj jaroj UEA kaj ILEI funkciigis apartajn ekzamenojn. La ekzamenoj de UEA estis restarigitaj en 1982 de la estrarano Baldur Ragnarsson (IS), kaj okazis unufoje jare en la Universala Kongreso kun 5 ĝis 20 kandidatoj jare, plejofte sub la gvido de mag. Irena Szanser (PL). Forfalis tiam la tre postulema supera nivelo, kiun nur kvin homoj sukcesis trapasi.

En 1986 UEA delegis siajn edukajn laborojn al ILEI, kiu plenumis la taskon pretigi kaj lanĉi komunan ekzamenan sistemon. Tio okazis en 1989, kun akcepto de regularo, starigo de Internacia Ekzamena Komisiono, nomigo de kvardeko da ekzamenantoj kaj aperigo de gvidilo. Proponataj niveloj restis elementa kaj meza. La nombro da sesioj jare rapide kreskis de unu aŭ du al sep ĝis dek, kun kandidatoj gamantaj inter 35 kaj 102 (en 1991). La ekzamenoj iĝis tutmondaj: en la periodo 1989-93 sukcesis 335 kandidatoj el 38 landoj (180 en Eŭropo, 120 en Azio, 28 en Ameriko, 6 en Afriko kaj unu el Aŭstralazio). Okazis 41 sesioj en 20 landoj (28 kun 186 sukcesintoj en Eŭropo, 6 kun 118 en Azio, 6 kun 30 en Ameriko kaj unu kun unu en Afriko). Ili okazis en kultur-centroj, universitataj kursejoj, ĉiunivelaj aranĝoj, naciaj kongresoj, ILEI-konferencoj, UK kaj IJK. Plenaj ĉiujaraj rezultolistoj aperis publike en *Internacia Pedagogia Revuo*, kun kvinjara resumo en la kvara numero de 1993.

La sekretariadon transdonis en 1994 Stefan MacGill (HU) al Hans ten Hagen (NL), kaj ĝi poste transiris al Bill Maxey (USA). Ekzamenaj sesioj daŭre okazas, diversloke.

La ekzamenoj strebas mezuri kapablon je la kvar komunikaj kapabloj – legado, skribado, aŭskultado kaj parolado. Gramatikaj konoj estas specife mezurataj nur en antaŭtesto; en la vera ekzameno ĉefrolas la komunika kapablo – al kiu tamen korekta lingvo-uzo evidente ludas gravan rolon. La ekzamenoj havas tri ĉefajn partojn. En la sekva testto, du sinsekvaj ciferoj rilatas respektive al la elementa kaj meza niveloj.

Skriba antaŭtesto

Daŭro: 40 minutoj.

Enhavo: Kvino da rapid-respondaj lingvaj ekzercoj.

Postulo: Atingo de 70% por eliro al la ekzameno mem.

Skriba parto

Daŭro: 3 horoj.

Enhavo:

1. Ekzerco pri aŭskulta kompreno. Respondu demandojn pri dufoje laŭtleigita teksto, kaj verku koncizan resumon pri ĝi.
2. Verku eseon de 400 / 600 vortoj
3. Lega kompreno: Legu tekston de ĉ. 250 / 400 vortoj kaj respondu dekon da demandoj pri ĝi.
4. Kulturaj konoj: Literaturo, Historio, Parol-komunumo, Organizado. Kutime testata per pariga ekzerco.



Parola parto

Daŭro: 20 minutoj. La kandidatoj ekzameniĝas unuope, antaŭ tri ekzamenantoj.

1. Respondi demandojn pri bildo aŭ serio da bildoj
2. Paroli kaj respondi demandojn pri du movadaĵ aŭ kulturaj aŭ literaturaj temoj elektitaj hazarde el dek / dek ses antaŭkoneblaj temoj.
3. Fari same pri du temoj el la ĉiutaga vivo.

Pri la lingvaj ekzamenoj de UEA/ILEI, vidu: <http://www.edukado.net/ekzilei.jsp>. Ekzistas jam de kvin jaroj akceptita regularo kaj strukturo por la restarigo de la supera ekzameno, sed mankas laborfortoj kaj rimedoj realigi ĝin. Necesas ankaŭ starigo de fakaj ekzamenoj fareblaj en Esperanto. Por ILEI gravas unuavice ekzamenoj pri instrukapablo.

(SMG)

9.2 Ekzamensistemo de IEI

La seminaria sistemo de la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) estas programo celanta eduki instruistojn en la uzo de la rekta metodo kaj ĝi konsistas el du diversaj gradoj: Enkonduka kaj Diplomiga. La Seminarioj estas gvidataj de persono rajtigita de IEI kiel Seminarigvidanto. Ekzameno okazas nur fine de la Diplomiga Seminario. Tiam la ekzamenado estas plenumata de Ekzamena Komisiono (EK) konsistanta el la Seminarigvidanto kaj IEI-Reprezentanto. Ĉiu intereso pri rektmetoda lingvoinstruado rajtas ĉeesti la Enkondukan Seminarion. Ne-ĉeestinto en la Enkonduka Seminario rajtas ĉeesti la Diplomigan Seminarion nur kiel observanto kaj tiukaze ne rajtas esti ekzamenata. La kandidatoj al la diplomiga ekzameno devas liveri al IEI raporton pri la kursoj gviditaj laŭ rekta metodo dum la interseminaria periodo surbaze de raportilo provizita de IEI. Ili atingi la sidejon de IEI plej malfrue tri monatojn antaŭ la dato anoncita por la komenciĝo de sesio por la Diplomiga Seminario, kiun la kandidato deziras ĉeesti. La diplomiga ekzameno konsistas el du partoj: parola kaj praktika. La parola parto temas pri: Esperanto-historio, -literaturo kaj -movado kaj pri metodiko de rektmetoda lingvoinstruado. La praktika parto konsistos el 20-minuta modellecio pri temo distribuota de la Seminarigvidanto en la unua seminaria tago. Pli da informoj kaj ekzemplero de la Ekzamena Regularo estas ricevebla ĉe <iei001@tiscali.nl>.

(AOR)

9.3 Ekzamensistemo de *lernu!*

La ekzamensistemo de *lernu!* (<http://lernu.net>) enhavas du kampojn kaj tri nivelojn. Tiel entute estos ses ekzamenoj kiam ĉiuj pretos. Rete eblas fari ekzamenojn por la baza kaj meza nivelo, ĉiujn tri eblos fari dum aranĝoj de TEJO kaj E@I. Jen mallongaj klarigoj pri la kampoj kaj niveloj:

La du kampoj

- Lingva (Por testi konojn de la lingvo Esperanto.)
- Kulturmovada (Por testi konojn pri la Esperanto-kulturo kaj movado.)

La tri niveloj

- Baza (Farebla per la reto.)
- Meza (Farebla per la reto.)
- Alta (Farebla dum aranĝoj de TEJO/E@I.)

(HL?)

Prezentu kaj diskutu:

Rakontu viajn spertojn pri ekzamenoj. Ĉu vi rekomendos ekzamenojn al viaj kursanoj? Kiun rolon povas ludi ekzamenoj en kurso? Por kio ili utilas? Kiujn mankojn ili havas? Ĉu estas ĉiam klara limo inter ekzameno kaj ludo? Kiel aspektas amuza ekzameno? Por kio tio servas?



10 Organizado

10.1 Kiel trovi lernantojn

10.1.1 Kontakto amaskomunikilojn

Se vi loĝas en urbeto, eble la amaskomunikiloj ŝatus intervjui vin pri via kurso. Sendu gazetaran komunikon al lokaj gazetoj pri via evento. Poste indas telefoni al via loko ĵurnalo kaj kontakti la ĵurnaliston pri kulturo. Tiam demandu ĉu interesus liajn legantojn legi pri E-kurso.

10.1.2 Reklamu

Estas multaj eblecoj reklami page kaj senpage. Senpage oni povas meti anoncon sur tabulon en butikum-centroj, universitatoj, bibliotekoj ktp. Verŝajne la plej efika maniero reklami page estas la parto de via loka ĵurnalo kiu havas sufiĉe malgrandan tekston kie oni povas reklami kontraŭ po kk cendoj por ĉiu vorto. Estas neimageble kiom multe da homoj legas tiujn reklamojn.

(Chuck Smith?)

10.2 Kiel organizi kursojn

Jen diskut-demandoj. Per tiuj seminarioj verŝajne konstatos ke tre varias la kondiĉoj, ebloj kaj gravaĵoj de unu mondparto al alia:

- 1) Kian kursejon oni elektu kaj kiel oni akiru la rajton uzi ĝin?
- 2) Kiajn helpilojn, maŝinojn kaj fizikajn kondiĉojn oni bezonas por realigi sukcesan kurson?
- 3) Kiuj estas la preferataj kurso-daŭroj, lecion-daŭroj kaj ofteco por viaspeca kurso?
- 4) Ĉu vi sola gvidos la kurson aŭ entiros la helpon de aliaj? Se jes, por kontribui kion?
- 5) Kiuj estas la eblecoj (aŭ devigoj) oficialigi kurson en via lando? Kiujn avantaĝojn tio portas?
- 6) Kion vi faros por certigi seriozan sintenon de la lernantoj al la studado?
- 7) Kion vi faros por establi kaj daŭrigi la deziratan kursan etoson, kaj kia tio estos?
- 8) Kiujn lernilojn vi uzos, kaj kiomgrade tiuj determinos vian kurso-planon? Se malmulte, kio determinos vian kurso-planon?
- 9) Kion vi faros por dokumenti vian kurs-planon kaj la dum-kursajn spertojn, ke ili utilu al vi (kaj eble aliaj) en estontaj kursoj.

10.3 Kiel instigi al envolvigo kaj plulernado

- 1) La nombro da partoprenantoj en nedevegaj kursoj tendencas fali tra la unuaj monatoj. Kion vi povas fari por malhelpi tion? Kiel aspektos viaj unuaj kvar lecionoj?
- 2) Kiel vi povas enmeti en vian kurson informojn aŭ spertojn pri la E-vivo?
- 3) Kion vi povas fari fine de lecionoj, por ke lernantoj volu reveni al la sekvaj?
- 4) Kiel vi povas provizi al lernantoj, dum la kurso progresas, eblecojn aldone ekzerci la lingvon, profundigi siajn konojn, starigi praktikajn kontaktojn kaj uzi eĉ la modeste lernitan lingvon por io utila?
- 5) Kion vi povas fari fine de la kurso, por ke kursanoj revenu por daŭriga kurso aŭ alimaniere plulernu kaj eniru la komunumon?



10.4 Kiel pritaksi kurson kun la lernantoj

- 1) Kiel eblas pritaksi la lernadon dum la kurso progresas? Ĉu indas fari tion?
- 2) Kiel vi traktos la malsamajn lern-rapidojn kiuj neeviteble montriĝos en viaj kursoj?
- 3) Kiel plej bone pritaksi la sukceson de la lernado fine de la kurso? Kiumaniere kontentigas plej bone la bezonon de la kursgvidanto? Kiumaniere plej bonvenas por la kursanoj?
- 4) Kiel oni povas mezuri la sukceson de la kurso el aliaj vidpunktoj ol la lingvo-lernado?
- 5) Kiuj estas tiuj aliaj vidpunktoj?

10.5 Informilbazoj

Seminarianoj bonvolu kunporti specimenojn de informiloj kiujn ili jam pretigis aŭ eldonis por reklami sian kurson, aŭ kiujn aliaj uzis tiucele. Kunportu ankaŭ informilojn uzitajn por konigi Esperanton sen ligo al specifa kurso. Se temas pri nacilingvaj informiloj, bv. pretigi tradukon en Esperanto!

Kiel devas diferenci enhavo kaj emfazo en nacilingvaj informiloj por komencanto-kursoj disde Esperant-lingvaj informiloj pri kursoj por progresantoj?

(SMG)



11 Instruorganizoj

11.1 Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estas faka organizo pri edukado kaj instruado kun Esperanto kiel laborlingvo, fondita en la jaro 1949. Ĝiaj membroj estas instruistoj kaj edukistoj kiuj instruas Esperanton aŭ uzas ĝin, aŭ iel ajn interesiĝas pri Esperanto en edukado. ILEI estas aliĝinta faka asocio de Universala Esperanto-Asocio, havas operaciajn rilatojn kun Unesko kaj membras en FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj). Ĝi havas sekciojn en pli ol 30 landoj kaj membrojn en preskaŭ 50. Vidu: <http://www.ikso.net/ilei>.

ILEI zorgas pri evoluo de metodiko de Esperanto, eldonado de lernolibroj kaj aliaj instruiloj, kaj pri aliaj bezonoj de siaj membroj. Ĝi eldonas oficialan organon *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) (<http://www.ikso.net/ilei/ipr>) kiu traktas teoriajn kaj praktikajn aspektojn de E-pedagogio kaj ILEI-agado, kaj la revuon *Juna Amiko* – kvarfoje jare por infanoj, junuloj kaj komencantoj. Vidu (<http://www.junaamiko.inf.hu/>) kaj krome la hejmpaĝon <http://www.lernu.net/>, kie *Juna amiko* havas paĝaron kun artikoloj en la biblioteko.

Ĉiujare okazas Konferenco de ILEI kun varia faka, kultura kaj distra programo. En la programo de Universalaj Kongresoj de Esperanto ILEI prizorgas la Tagon de la Lernejo, unutagan aranĝon por interŝanĝo de spertoj kaj prezento de la plej aktualaj atingoj en la E-eduka kampo. Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI kaj UEA organizas internaciajn ekzamenojn pri lingvokapablo kaj konoj de E-kulturo. Preparata estas enkonduko de ekzamenoj pri instrukapablo.

ILEI realigas la projektojn Interkulturo – por interkultura lernado per Esperanto kaj Interreto, kaj Flugiloj de Malfacila Vento – por instrukapabligo unuavice de junaj esperantistoj. Ĝi ankaŭ subtenas aliajn edukprojektojn (Euroscola, Edukado.net, lernu! kc) kaj planas novajn.

(RP/SMG)

11.2 Internacia Esperanto-Instituto

IEI estis fondita la 24-an de majo 1930 en Den Haag (Nederlando) kaj ĝi daŭrigas la laboron de Andreo Cseh, diskonigante lian metodon de instruado. IEI organizas Seminariojn por trejni novajn Cseh-metodajn instruistojn kaj disponigas al ili tiucelan materialon. La semina sistemado de la IEI estas programo celanta eduki instruistojn en la uzo de la rekta metodo kaj ĝi konsistas el du diversaj gradoj: Enkonduka kaj Diplomiga. La kandidatoj, kiuj sukcese trapasas la diplomigan ekzamenon, estas enskribitaj en la registroj de instruistoj de IEI kaj rajtas gvidi Cseh-kursojn ĉie en la mondo laŭ invito de E-grupoj. Ekde 1991, responde al la bezono havi pli da gvidantoj de Cseh-seminarioj IEI komencis trejni ilin. Kiu deziras atingi la kompetentecon gvidi Cseh-seminariojn, devas esti diplomita Cseh-instruisto kaj posedi landan aŭ internacian ateston de profesia fremdlingva instruisto. Plie IEI kalkulas je Biblioteko specialiĝinta pri instruado/edukado kaj ankaŭ havas Libroservon. De 2002 IEI subtenas la ekziston de katedro pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en la Universitato de Amsterdam.

(AOR)

11.3 Tutmonda Esperantista Junulara organizo

TEJO estas internacia, neregistara junulara organizo fondita en 1938, kiu laboras por antaŭenigi pacon kaj interkulturan komprenon inter junuloj ĉirkaŭ la mondo per Esperanto. Ĝi aktive laboras pri la nuntempaj problemoj kaj temoj de junuloj, aparte rilate al lingvaj kaj kulturaj aferoj. El ĝia centra oficejo en Nederlando, ĝi kunordigas la laboron de siaj pli ol 40 landaj sekcioj kaj membroj en pli ol



80 landoj. TEJO kunlaboras ankaŭ kun regionaj kaj internaciaj institucioj kiel la Eŭropa Junulara Forumo, UNESKO kaj UN.

(El la hejmpaĝo: <http://www.tejo.org/>)

12 Fermaj vortoj

Jen la stato de la Manlibro pri Instruado de Esperanto por la baldaŭ okazontaj seminarioj de la projekto “Flugiloj de Malfacila Vento”. La verko estas klare ankoraŭ longe for de la fina stato kiun ni celas – kaj eble ĝi neniam atingos tiun nirvanon – sed restos verko eterne en evoluo. Tamen, ĝi provizas solidan bazon por la gvidantoj kaj partoprenontoj. Verŝajne neniam antaŭe, partoprenontoj al instru-trejna seminario ricevis anticipe tiom da prepar-materialo verkita specife por tia kurso.

Do, bonvolu legi atente kaj pripense la enhavon. Kelkloke ni starigis specifajn taskojn, per kiu vi povas prepari vin por diskutoj, aŭ kunporti materialojn aŭ ideojn por prezento. La seminariaj horoj ne estas multaj, ni ĉerpos maksimumon el ili, se vi venas bone preparitaj kaj pretaj aktive partopreni.

Fine, koran dankon al ĉiu kiu kontribuis al ĉi tiu verko, kaj per tekstoj, kaj per la rimedoj realigi ĝin. Ni kalkulas je viaj helpoj kaj engaĝigo dum ĝia plua kresko kaj rafinado. Ni bonvenigas plie kontribuojn de novaj fortoj, interalie la partoprenontoj de la seminarioj.

Efika trejnado de instruistoj ludas ŝlosilan rolon en la prospero de nia lingvo kaj ĝia popolo. Tial, tre bonvenas la nunaj seminarioj kaj la materialoj kiuj apogas ilin.

(SMG)